

# AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) SAN MARINO

Accademia Internazionale delle Scienze  
Académie Internationale des Sciences  
Internationale Akademie der Wissenschaften  
International Academy of Sciences

Laŭjura sidejo en la Respubliko de San Marino



Estimataj kaj karaj samakademianoj,

ĉi tiu letero atingas vin kun mia subskribo, ĉar la Prezidanto Prof. Frank estas pormomente malhelpata, kaj multon de la informoj mi dankas al la perfekte funkcia informofico, pri kiu respondecas OProf. R. Fössmeier.

Multo okazis dum la baldaŭ finiĝanta jaro, multo okazos en la baldaŭ malfermiĝanta. La Senato kunvenis en Freising en marto 2006 kaj ellaboris la daŭrigon de la jam startintaj iniciatoj. Venis reprezentantoj de Bulgario, kie la universitato de Karlovo, fondita kaj antaŭenpuŝata de EProf. B. Leonov, ekhavis burokratajn malfacilaĵojn, sed nun la ŝancoj pri sukcesa konkludiĝo ŝajnas pli fortaj. Nia ŝildo plu staras sur la kontraŭo de tiu universitato.

En la Universitato "Lucian Blaga" en Sibiu nia kursprogramo pluas kaj AIS daŭre ekzistas kiel departemento interfakultata, kun sia ĉambro kaj sia ŝildo: en pasinta majo okazis studadsesio kaj magistriĝis studentino, sed AIS devas fronti la konkurencon de aliaj katedroj pri allogo de pagantaj studentoj. En la fino de la vintro en 2007 nia koleginino EProf. Sara Konnerth planas tie novan sesion. Ekestis ankaŭ interaktoj, ankoraŭ sen definitiva konkludo, kun privata rumana-germana universitato en Sibiu. La vigla agado de Esterordaj Profesoroj, plifortigita per abolicio de eksplacita mandatfino kaj neindiko de specifa fako, donas pli da energio al novaj entreprenoj en landoj kie nia establiĝo estas ankoraŭ en nefirma stato.

En Komárno AIS starigis fortan centron, partopreninte en la financado de konstruaĵoj en la urbocentra "Eŭropa Korto" per la antaŭa aĉeto de ses domoj, kiuj ricevis la nomojn de niaj forpasintaj kolegoj Neergaard, Pancer, Popović, Szerdahelyi, Schulz, Tyblewski; la laste aĉetita kiel sepa ricevis, en septembro 2006, la nomon de kol. Lánský. Tie okazis kun sukceso SUS 29. Dum ĝi eblis aŭskulti naŭ universitatnivelaĵojn, kaj kromajn kvin prelegojn pri sciencaj

Verehrte, liebe Mitglieder unserer Akademie,

dieser Rundbrief erreicht Sie mit meiner Unterschrift, da unser Präsident, Prof. Dr. habil. Frank, derzeit verhindert ist. Einen großen Teil des Inhaltes verdanke ich unserem ausgezeichneten Informationsbüro unter der Leitung von OProf. R. Fössmeier.

Vieles hat sich im ablaufenden Jahr ereignet, vieles wird sich im bevorstehenden ereignen. Der Senat kam im März 2006 in Freising zusammen und arbeitete an der Fortsetzung unserer begonnenen Maßnahmen. Vertreter aus Bulgarien erstatteten Bericht; die im dortigen Karlovo gegründete und von EProf. B. Leonov betriebene Universität hatte Schwierigkeiten mit den Behörden; inzwischen bestehen aber gute Aussichten auf eine erfolgreiche Beilegung. Unser Name steht weiterhin auf dem Universitätsgebäude.

An der Lucian-Blaga-Universität in Sibiu-Hermannstadt läuft nach wie vor unser Studienprogramm: die AIS bildet dort eine Fakultätsabteilung mit eigenem Hörsaal. Im Mai fand dort eine Studententagung statt; eine unserer Studentinnen erwarb den Master-Grad. Allerdings spürt die AIS hier die Konkurrenz der Lehrstühle um zahlende Studenten. Gegen Ende des Winters plant unsere Kollegin EProf. Sara Konnerth eine weitere Studententagung. Es kam auch zu Verhandlungen mit der rumänisch-deutschen Privatuniversität in Sibiu-Hermannstadt, die aber noch ohne konkrete Ergebnisse sind. Die initiative Tätigkeit und die gefestigte Stellung unserer Außerordentlichen Professoren, auf deren Dokumenten kein Mandatsablaufdatum mehr steht und keine Fachbezeichnung angegeben wird, gibt neuen Vorstoßen in Ländern, wo unsere Stellung noch ungefestigt ist, mehr Nachdruck.

In Komárno hat die AIS durch Teilnahme an der Finanzierung eines Gebäudekomplexes am Europa-Platz im Stadtzentrum eine solide Basis geschaffen. Die zuerst erworbenen sechs Häuser erhielten die Namen unserer verstorbenen Kollegen Neergaard, Pancer, Popović, Szerdahelyi, Schulz und Tyblewski; das zuletzt erworbene siebte erhielt im September 2006 den Namen des Kollegen Lánský. In diesem Zentrum fand die erfolgreiche Studententagung SUS 29 mit neun Hochschulkursen aus vier der sechs

temoj. Diplomiĝis je nivelo de magistrecio aŭ doktoreco 7 kandidatoj. Aliaj vizitintoj de la kursoj venis el lokoj kie ekzistas institutoj kunlaborantaj kun AIS. En la kromprogramo de SUS 29 la SUSanoj vizitis la arkeologian elfosejon de la romia fortikaĵo Kelemantia, kiu donas la nomon al nia Libera Eŭropa Universitato Kelemantia de AIS, LEUKAIS. Aliflanke la klopodoj agnoskigi LEUKAIS de la Slovaka Respubliko kolizias kun postuloj ĝis nun de ni neplenumebaj, tiel ke oficiala instrupermeso kun ŝtata agnosko de diplomoj ankoraŭ ne estis atingita. Klopodoj atingi tian permeson de la hungaraj instancoj, profitante la fakton ke en Komarno vivas hungara minoritato, ankoraŭ ne donis rezultojn.

En Pollando la rilatoj de AIS kaj la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK), provizore haltigitaj post dekjara kunlaboro, denove fariĝis konstruaj pere de subskribita kontrakto, kaj studentoj de ISTK povos iĝi samtempe studentoj de AIS kaj formos la studentaron de AIS-klerigejo Bydgoszcz (AKB).

La agado en Bulgario plifirmiĝis per kontrakto inter AIS kaj ESPERINFORM BL Karlovo, kontrakto kiu precizigas la kontraktan jam ekzistantan inter AIS kaj la Internacia Universitato Karlovo kiel centro de AIS por distanca agado en Bulgario. ESPERINFORM BL Karlovo zorgos pri la administrado, librotenado kaj eduka agado de la klerigejo.

Kunlaboro kun la Eŭropa Jura Universitato "Justo" en Moskvo, klerigejo de AIS efikis pozitive precipe rilate al la grandeco de la membraro.

AIS ĉeestis ankaŭ aliloke. En Florenco la 28an de julio estis simpozio kunorganizita de AIS, la Akademio de Esperanto, la Itala Lingva Akademio kaj la Fakultato pri Beletro de la Florenca Universitato. La temo estis "Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini al la nuna tempo". Bruno Migliorini estis ĉefa skolestro de la itala lingvistiko, siatempe profesoro pri historio de la itala lingvo ĉe la universitato de Florenco, prezidanto de la Itala Lingva Akademio kaj vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. Ĉiujn simpoziajn prelegojn, krom unu, prezentis AIS-anoj. Dum la Kongreso de Esperanto en Florenco okazis, kiel jam plurfoje, AIS-studadesio

wissenschaftlichen Sektionen sowie fünf wissenschaftlichen Vorträgen. Sieben Kandidaten legten erfolgreich die Prüfung als Magister oder Doktor ab. Ein Teil der Teilnehmer kam von unseren Partnerinstituten. Im Rahmenprogramm von SUS 29 fand ein Besuch der Ausgrabungsstätten der römischen Festung Kelemantia statt, nach der unsere Freie Europäische Universität Kelemantia der AIS, LEUKAIS; benannt ist. Leider stießen unsere Bemühungen zur Anerkennung der LEUKAIS durch die slowakischen Behörden auf Anforderungen, die wir derzeit nicht erfüllen können; daher verfügt die LEUKAIS noch über keine Lehrerlaubnis mit staatlicher Anerkennung ihrer Diplome. Versuche, eine solche Erlaubnis von den ungarischen Behörden zu erhalten – Komárno ist etwa zur Hälfte ungarischsprachig – erbrachten noch keinen Erfolg.

In Polen haben die Beziehungen zwischen der AIS und dem Internationalen Studium für Tourismus und Kultur (ISTK), die nach zehnjähriger Zusammenarbeit zunächst zum Stillstand gekommen waren, durch den Abschluss einer neuen Vereinbarung wieder ein konstruktives Stadium erreicht; Studenten des ISTK können gleichzeitig Studenten der AIS werden und gehören zur AIS-Bildungsstätte Bydgoszcz (AKB).

Unsere Tätigkeit in Bulgarien erhielt neue Impulse durch einen Vertrag zwischen der AIS und der ESPERINFORM BL Karlovo, der den bestehenden Vertrag zwischen der AIS und der Internationalen Universität Karlovo als Tätigkeitszentrum der AIS für Bulgarien präzisiert. ESPERINFORM BL kümmert sich um die Verwaltung, Buchhaltung und den Unterricht der Bildungsstätte.

Die Zusammenarbeit mit der Europäischen Juristischen Universität „Justo“ in Moskau, einer Bildungsstätte der AIS, wirkt sich besonders positiv auf unseren Mitgliederbestand aus.

Auch anderswo war die AIS präsent. In Florenz veranstalteten am 28. Juli die AIS, die Akademio de Esperanto, die Akademie für die Italienische Sprache (Accademia della Crusca) und die schöngesichtigen Fakultät der Universität von Florenz ein gemeinsames Symposium zum Thema "Wege der Interlinguistik: von Bruno Migliorini bis in unsere Zeit". Bruno Migliorini war Leitfigur der wichtigsten Schule der italienischen Linguistik, Professor für die Geschichte der italienischen Sprache, Vorsitzender der Accademia della Crusca und Vizepräsident der Akademio de Esperanto. Bis auf einen waren alle Vortragenden des Symposiums Angehörige der AIS. Während des Esperanto-Weltkongresses in Florenz fand, wie bereits mehrmals,

kun kursoj kies unuaj prelegoj estis enkadrigitaj en la Internacia Kongresa Universitato. Dum la jarŝanĝa Internacia Festivalo en Trier (Germanio) AIS partoprenis en la kromprogramo; same AIS protagoniste partoprenis en la celebrado de la 100 jaroj de ISAE en Tavoleto (Italio). Plue, AIS aŭspiciis la Lingvopolitikan konferencon de la Viŝegrad-ŝtatoj, enprogramigitan por la fino de novembro en Bratislavo.

Kroma iniciato estis ankaŭ la fonda de embria Kultur-Parlamento, lanĉita de kolegoj Frank kaj Heinrichs kaj gvidata de doc. Warzel. Estis starigitaj ankaŭ kontaktoj kun "Verein Deutsche Sprache" cele al estonta kunlaboro.

Klopodoj enlistiĝi en internaciaj organizoj de universitatoj ankoraŭ ne donis konkretajn rezultojn. Kun la germana datenbanko Anabin la konkludo estis negativa, kun la Internacia Asocio de Universitatoj kontaktoj estis reprenitaj kaj ankoraŭ daŭras. Eldonado de grkg, kiun kunfinancas la Subtena Sektoro de AIS, fluis regule kvar fojojn en la jaro; male "Acta Sanmarinensia", post feniksa renaskiĝo antaŭ tri jaroj fare de eldonejo Leins denove sinkis en silenton jam pli ol unu jaron.

Alia agado de AIS estis kunlaboro kun la Moskva Ŝtata Industria Universitato kaj la Universitato "Lucian Blaga" en Sibiu, kiu kondukis al redaktado de ampleksa instrumaterialo, testita poste per dekoj da studentoj: dulingvaj virtualaj studlibroj kiel lernotekstoj por malĉea instruado. Tiu estis la konkludo de la jam pli frue iniciatitaj KKKK (Komunikad-kibernetikaj kernkursoj), kiu kronis dekjaran laboron inter universitataj docentoj germanaj, rusaj, slovakaj kun helpo de alilandaj studentoj. Ampleksa priskribo de tiom longa klopodado troviĝas en artikolo de N. Maksimova en GrKG/H 47/3. Krome estas en la reta biblioteko de AIS kursoj libere deŝuteblaj; en presita formo ni menciuj, inter la diversaj, nur unu rezulton de kunlaboro starigita tra AIS inter Prof. Minnaja de la universitato de Padova kaj Prof. Ŝejpak de la Moskva Industria Ŝtata Universitato: komuna libro pri historio de la scienco kaj tekniko, eldonita de la Moskva Universitato.

Ankoraŭ embriaj, sed promesplenaj, estas la kontaktoj kun ADoc. Preradović, nomumi-

eine AIS-Studentagung mit Kursen statt, deren erste Vorträge zur Internationalen Kongress-Universität gehörten. Während des Internationalen Festivals zum Jahresbeginn in Trier veranstaltete die AIS ein Zusatzprogramm; im Sommer trug sie maßgeblich zu den Feierlichkeiten zum 100-jährigen Jubiläum der ISAE in Tavoleto (Italien) bei. Für eine sprachpolitische Tagung der Visegrad-Staaten im November in Bratislava übernahm die AIS die Schirmherrschaft.

Eine weitere Maßnahme war die Gründung der Vorstufe eines Kulturparlaments, das von den Kollegen Frank und Heinrichs initiiert und von Herrn Privatdozent Warzel geleitet wurde. Mit dem "Verein Deutsche Sprache" wurden Kontakte zwecks künftiger Zusammenarbeit aufgenommen.

Bemühungen zur Aufnahme in internationale Hochschulorganisationen erbrachten noch keine konkreten Ergebnisse. Die deutsche Hochschuldatenbank Anabin möchte die AIS weder positiv noch negativ erwähnen; der Kontakt zum Internationalen Universitätenverband wurde wieder aufgenommen und besteht weiter. Die Zeitschrift GrKG/H erscheint, vom Fördersektor der AIS unterstützt, regelmäßig viermal im Jahr, dagegen stockt das Erscheinen der „Acta Sanmarinensia“, vor drei Jahren beim Leins-Verlag gleichsam aus der Asche wiedergeboren, nun schon seit über einen Jahr.

Ein weiteres Projekt der AIS zusammen mit der Moskauer Staatlichen Industrieuniversität und der Lucian-Blaga-Universität in Sibiu-Hermannstadt betrifft die Herausgabe umfangreichen Lehrmaterials, das an mehreren Dutzend Studenten getestet wurde. Es handelt sich um zweisprachige Lehrbücher als Material für den Fernunterricht. Dies war der krönende Abschluss der KKKK (kommunikationskybernetische Kern-Kurse), einer zehnjährigen Zusammenarbeit deutscher, russischer und slowakischer Hochschuldozenten unter Mithilfe von Studenten aus weiteren Ländern. Eine ausführliche Beschreibung dieser langjährigen Anstrengungen findet sich in einem Artikel von N. Maksimova in GrKG/H 47/3. Außerdem enthält die Netzbibliothek der AIS frei herunterladbare Kurse; in Druckform erschien, um nur ein Beispiel zu nennen, das Ergebnis einer von der AIS vermittelten Zusammenarbeit zwischen Prof. Minnaja von der Universität Padua und Prof. Sheypak von der Moskauer Staatlichen Industrie-Universität, ein gemeinsames Buch über die Geschichte von Wissenschaft und Technik, herausgegeben von der Moskauer Universität.

Noch im Frühstadium, jedoch vielversprechend sind Kontakte mit ADoc. Preradović, der zum

ta EProf. cele al fondo de AIS-filio en la universitato de Banja Luka (Bosnio-Hercegovino), kaj kun s-ro Mario Lazaro Azcuy, kiu proponas kunlaboron en Kubo.

La laboro cele al interna organiziĝo vidis viglan debaton pri novaj redaktoj de diversaj regularoj. Surbaze de la konstitucio ekestis nova honorregularo; proponoj pri la instru-, klerig-, ekzamen-, kunsid- kaj alvokoregularo estas diskutataj aŭ jam decidpretaj. Ĝis somero 2007 okazu decido pri ili.

Se certgrade AIS povas fieri pri la multaj kulturaj rezultoj atingitaj en la jaro 2006, demando estas pri la estonto. SUS 30 okazos en San Marino kiel tradicie dum la unua semajno de septembro 2007. Tie devas okazi generacia ŝanĝo. La nuna Senato orbitis ĉirkaŭ la kolosa energio de prof. Helmar Frank, ĉefa kunfondinto de AIS jam en 1983 en San Marino kaj iniciatinto de preskaŭ ĉiuj frutempaj iniciatoj. El la tiutempaj aktivuloj nur li restis surpostene dum kvaronjarcento; kolego Pennacchietti restis dum dudek jaroj, sed ankaŭ la aliaj nunaj senatanoj kaj vicseknatanoj servis dum pluraj mandatoj. Novaj fortoj, ĝis nun nur flanke partoprenintaj pli kiel spektantoj ol kiel protagonistoj, estu pretaj por surprizi la taskojn. La agado estas diverskampa kaj diverslanda, sed precipe necesas novaj personoj: la stilo kaj la ideoj de la ĝisnunaj gvidantoj estas jam konataj, kaj verŝajne ili ne sukcesas atingi pli grandajn sukcesojn ol ili jam atingis ĝis nun: necesas ideoj kaj strategioj novaj por fronti la ĉiam ondumantan situacion kaj la ĉiam novaj defioj. AIS estas la plej granda, kvankam feliĉe jam ne plu la sola, universitato kies ĉefa lingvo estas esperanto: ĝia ŝrumpo pro manko de fortoj estus malgajno neeltenebla por tiuj kiuj kredas je la internacieco kaj sennacieco de la scienco.

Padovo, 2006-11-21

Zweck der Gründung einer AIS-Zweigstelle an der Universität Banja Luka (Bosien-Herzegowina) zum EProf. ernannt wurde, und mit Herrn Mario Lazaro Azcuy, der eine gemeinsame Tätigkeit in Kuba vorschlägt.

Die Arbeiten zur inneren Organisation wurden von lebhaften Diskussionen über die Neufassung unserer Regularien begleitet. Auf der Grundlage unserer Verfassung entstand eine neue Ehrenordnung; Vorschläge zur Bildungs-, Prüfungs-, Sitzungs- und Berufungsordnung werden diskutiert oder sind bereits beschlussreif. Bis zum Sommer 2007 sollen entsprechende Entscheidungen fallen.

Obwohl die AIS einen gewissen Stolz auf die vielen kulturellen Erfolge des Jahres 2006 empfinden kann, muss die Frage nach unserer Zukunft gestellt werden. SUS 30 wird 2007 in San Marino stattfinden, wie üblich in der ersten Septemberwoche. Dort muss ein Generationswechsel stattfinden. Der jetzige Senat wurde getragen von der ungeheuren Energie von Prof. Helmar Frank, dem Hauptmitbegründer der AIS 1983 in San Marino und Initiator der meisten ihrer frühen Maßnahmen. Von den Aktiven dieser Zeit blieb er allein ein Vierteljahrhundert auf seinem Posten, sein Kollege Pennacchietti über zwanzig Jahre, aber auch die anderen Senatoren haben nun schon mehrere Amtszeiten hinter sich. Neue Kräfte, die sich bisher mehr von ferne, mehr als Zuschauer denn als Handelnde beteiligt haben, sind gefragt, die Aufgaben zu übernehmen. Unsere Tätigkeit ist vielfältig und länderübergreifend, vor allem aber brauchen wir neue Personen: Stil und Ideen der bisherigen Führungspersonen sind bekannt, und voraussichtlich werden sie keine größeren Erfolge erzielen als die bereits erzielten. Wir brauchen neue Ideen und Strategien, um die sich wandelnde Situation und die ständig neuen Herausforderungen zu bewältigen. Die AIS ist die größte, glücklicherweise nicht die einzige Universität, deren Hauptsprache Esperanto ist; würde sie aus Mangel an Kräften verkümmern, so wäre das ein unerträglicher Verlust für die, die an die Internationalität, an die Nationslosigkeit der Wissenschaft glauben.



OProf. Carlo Minnaja - Vicprezidanto